Matthias Claudius,

Adventa kanto

tradukita de Joachim Gießner

Ĉiam kandelo pli
en kron', plektita kaj bela,
ke ĝi lumu por ni
tra la tempo malhela.

Du kaj tri, poste kvar!
Lumas sur l'kron' la brileto!
Lumas ankaŭ homar'...
Lumas nia ĉambreto!

Kaj eĉ lumas la ter',
festas la sanktnoktan venon.
Vi, en la koro esper',
sentas la benon.

Traduko de la Germana poemo "Lied im Advent" de Matthias Claudius *(∗1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de* Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-940-1890 (2013-11-28 21:57:39)

Tiu ĉi poem-teksto troviĝas en la reta kolekto `http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf`*. Tiun oni trovas alklakante sur la germana-lingva vikipedia paĝo pri Joachim Giessner* `http://de.wikipedia.org/wiki/Joachim_GieΓ§ner`*, sub "Weblinks".*